

## Esperanto kaj UNESKO (por UK en Bonaero, 2014 Julio 29)

Ronald J. Glossop, Profesoro Emerita, Sud-Ilinojsa Universitato en Edŭardsvilo, Usono  
<rglossop@mindspring.com>

Kiam Esperantistoj pensas pri la interago inter Esperanto kaj UNESKO, ili kutime pensas pri la gravaj rezolucioj adoptitaj de UNESKO en 1954 kaj 1985. Sendube tiuj rezolucioj estis grandaj sukcesoj por Esperanto. Ni notu kelkajn detalojn.

La rezolucio de 1954 adoptita en Montevideo, Urugvajo, diras, ke UNESKO "notas la rezultojn atingis de Esperanto en la kampo de internaciaj intelektaj rilatoj kaj la proksimigo de la popoloj de la mondo" kaj "rekonas ke ĉi tiuj rezultoj harmonias kun la celoj kaj idealoj de UNESKO." Plue la Ĝenerala Konferenco de UNESKO "rajtigas la Direktoron Ĝeneralan atenti al la aktualaj evoluoj rilate al la uzo de Esperanto rilate al edukado, scienco, kaj kulturo, kaj al ĉi tiu celo kunlabori kun la Universala Esperanto-Asocio pri aferoj rilate al ambaŭ organizoj."

La rezolucio de 1985 adoptita en Sofia, Bulgario, diras, ke UNESKO rekonas, ke dum la periodo post 1954 Esperanto "multe progresis kiel rimedo por la antaŭenigo al komuna vidpunkto inter popoloj kaj kulturoj de diversaj landoj tra plejparto de la regionoj de la mondo kaj plejparto de diversaj homaj agadoj" kaj "rekonas la grandan potencialon de Esperanto por internacia kompreno kaj komunikado inter popoloj de malsamaj landoj" kaj sekve "gratulas la Esperanto-movadon je ĝia centjariĝo." Plue la Ĝenerala Konferenco de UNESKO "petas la Direktoron Ĝeneralan daŭre rigardi la evoluon de Esperanto kiel rimedo por pli bona interkompreno inter diversaj landoj kaj kulturoj" kaj "invitas la Membro-Ŝtatojn observi la centjariĝon de Esperanto per taŭgaj eventoj, deklaroj, kaj eldonado de specialaj poŝtmarkoj, kaj tiel plu, kaj antaŭenigi la enkondukon de stud-programo pri la lingva problemoj kaj Esperanto en siaj lernejoj kaj institucioj por pli alta edukado."

Tamen ni devus memori, ke ekzistas multaj aliaj gravaj interagoj inter Esperanto kaj UNESKO. Unu grava afero estas la mesaĝoj, kiujn UEA ofte ricevas de la Direktoro Ĝenerala de UNESKO dum la Universalaj Kongresoj. Ekzemple mi bone memoras, ke la UK ricevis salut-mesaĝojn de Amadou-Mahtar m'Bow, kiam li estis Direktoro Ĝenerala dum la jaroj 1977 ĝis 1986, tio estas, unu jaron post la adopto de la grava rezolucio.

La nuna situacio ankaŭ estas tre bona. Sinjorino Irina Bokova, la nuna Direktoro Ĝenerala de UNESKO, sendis salut-mesaĝojn al la UK en 2011 en Kopenhago kaj ankaŭ al la UK en 2013 en Rejkjaviko. Parto de tiu lastjara mesaĝo diris: "Ekde ĝia fondo antaŭ pli ol cent jaroj la Esperanto-movado estas aliancano kaj amiko al la tuta sistemo de Unuiĝintaj Nacioj kaj aparte al UNESKO. Kune, laŭ la mandato de UNESKO, ni laboras por pligrandigi la manierojn de komunikado inter popoloj kaj uzas ilin por la celo de reciproka interkompreno."

Plue Sinjorino Bokova faris aliajn deklarojn, kiuj harmonias kun niaj komunaj celoj. Ekzemple je la 21-a de Februaro 2014 en sia mesaĝo por la Tago de la Gepatra Lingvo ŝi diris, "Samtempe la alproksimiĝo de popoloj en 'monda vilaĝo' eĉ pli necesigas la strebadojn por interkultura kompreno kaj dialogo. En la hodiaŭa mondo la normo estas la uzo de minimume tri lingvoj, unu loka, unu pli vaste uzata, kaj unu internacia lingvo por komuniki sur niveloj loka kaj tutmonda." Ĉi tiu mesaĝo de sinjorino Bokova aperis en la ses oficialaj lingvoj de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO, plus du aliaj lingvoj, ŝia propra

patrina lingvo, la bulgara, kaj la Internacia Lingvo Esperanto! Pensu pri tio. La speciala deklaro de la Direktoro Ĝenerala de UNESKO aperis en Esperanto kune kun aliaj lingvoj.

Ŝajnas al mi, ke denove nun ekzistas tre bona rilato inter Esperanto kaj UNESKO.